

Kultura Identeco

Kultura identeco estas tio per kio rekoniĝas homa komunumo socia, politika, regiona, nacia, etna kaj religia laŭ valoroj, lingvoj, pensmanieroj, praktikoj, tradicioj kaj kredoj.

Des pli gravas pripensi la demandon pri kultura identeco, ĉar niaj tiel nomataj modernaj socioj travivas kulturajn kaj generaciajn krizojn. Evidente, ekzistas diversaj aliroj al la demando pri identeco; sociologia, psikologia, historia kaj ĉiu plenrajte konstruas propran studobjekton. En tiu-ĉi koncepto pri la sociaj sciencoj kaj pli precipe pri kultura identeco, kio pri tiu-ĉi identeco laŭ valoroj kaj kredoj?

La afrika kulturo estis delonge neigita en tiu senco, ke oni parolis pri sovaĝuloj anstataŭ pri kulturo.

La valoroj de la afrika kultura identeco agnoskiĝas per familio, komunumo, laboro, merito, reciproka respekto kaj socia kohereco. El la politika vidpunkto, ekzemple, ĝi estas la partia devontigo de homo flanke de partio, por ke kune ili povu realigi problemojn pri disvolviĝo. Starigo de regnoj regataj de reĝoj kaj eminentuloj.

Laŭsocie, en nia ĉiutaga vivo, nia vizio pri aferoj kaj rigora observado de praulaj ritoj kaj tradicioj. Ekzemple, por edziĝi en Afriko laŭ tradicio, oni devas pagi la doton de la knabino, kunigante ne nur la viron al la virino, sed ankaŭ la du familiojn.

El la ekonomia vidpunkto tio vidiĝas laŭ la ekonomiaj aktivaĵoj, en kiuj oni plenumas sin. En Moba-lando, ekzemple, la agrikulturo, bredado kaj forĝado fare de viroj kaj preparado de loka biero. OKONKWO, rolulo de la romano "La kolapsanta mondo de CHINUA ACHEBE", laboris kaj posedis plurajn grenejojn.

Laŭkulture, la komuna observado de la praula festado kaj ceremonio ligitaj al la praulaj havaĵoj far homoj. La uzo de Sobadi (loka brando) dum la tradiciaj aktivaĵoj, ekzemple. Alia ekzemplo: la elekto de antaŭnomoj por novnaskitoj. En Guin-lando estas nomoj kiel Laté, Folly, Dédé, Kokoé ktp ... La socia identeco estas atribuita al familia membreco. Infanoj de la reĝa familio de Aneho portas la nomon LAWSON.

Afrikanano esence estas kredanta estaĵo. Afrika religio instigas la popolojn al laboro. La ekzemplo de la invokado de la naturaj spiritoj favoraj al agrikulturo, kolektado kaj ĉasado, simile al la egiptaj dioj. Bedaŭrinde nuntempe la enportaj religioj en Afriko ne spronas spiriton de laborproduktiveco. Baze de tio religio povas iĝi kulturo, kiam ĝi estas malsakrilegita.

La grava afero estas antaŭenigi niajn afrikajn kulturajn valorojn malgraŭ ke ili suferas pro ŝoko de kontakto kun alikontinenta civilizo, kiu emas ĉion niveli. Necesos, ekzemple, kreo de centprocente afrikaj fabrikoj por produktado de Lokpo (tradiciaj teksaĵoj, kiujn surhavas homoj dum solenaj okazoj), afrikaj perloj nomataj "Ĝonu".

La kultura identeco rekomendas egalecon inter ĉiuj kulturoj kaj ekskludas ĉiujn aliajn formojn de subigo. Tiel, por finatingo de kultura heredaĵo kaj novigo de interkultura komunikado, ni bezonas malfermi nin al aliaj kulturoj kaj konservi niajn praulajn valorojn.

Skribas Mélonékou Djesco François